



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

ESPERANTISMO KAJ SKOLTISMO

LA BUDAPEŝTA JAMBOREO KAJ ESPERANTO

Dum la 2-16 de Aŭgusto, 1933 okazis la IV^{ta}. Internacia Jamboreo por skoltoj, en la Reĝa Parko de Godollo.—Godollo estas apud-Budapeŝta vilaĝo,

garujo, kune kun la kreinto de la Institucio, Lordo Baden-Powell eniras la kampon rajdante sur belaj ĉevaloj. La du ĉefuloj salutas la skoltaron tie kunigitaj. En tiuj emociplenaj momentoj, miloj da kolomboj estis liberigataj, kaj dum momento ili flugas nube malaperante en malproksimecon. Oni spiradas pacon kaj komprenemon.



ESPERANTIRTAJ SKOLTOJ ĈE LA BUDAPEŝTA JAMBOREO

kies plej rimarkinda loko estas la Reĝaj Kastelo kaj Casparko. En tiu-ĉi loko oni starigis la Tendaregon, kiu kunigis 5.363 tendojn loĝitaj de 26.144 skoltoj venintaj el ĉiuj ĉieldirektoj.

La 2 an. Aŭg. oni oficiale inaŭguris la Jamboreon. En la paradejo staras skoltoj el 53 diversaj landoj kunigitaj per unu sola idealo: Homaramo. En la estradoj amasiĝas arego da publiko. Almenaŭ 60.000 personoj salutas nun entuziasme per granda aplaŭdado la skoltojn.

Sed dum momento ĉio estas muta. Tra l'aero oni ekaŭdas la imponajn notojn de la hungara himno, dum Admiralo Horthy, reganto de Hun-

Admiralo Horthy parolas nun al la skoltoj. Li bonvenigas ĉiujn kaj deziras, ke ili ĉiuj interfratiĝu, kiel veraj skoltoj. Li petas, ke ni akceptu tutkore tiun tendarlokon, kiun la hungara lando metas al nia dispono. Li esperas, ke ni trovos nin tute same, kiel hejme.—Sekvas interese ga parado, en kiu partoprenas ĉiuj skoltoj. Belega kaj kurioza ĝi estas. La publiko akلامas konstante la skoltojn. Kiel veraj fratoj marŝas francoj, poloj, finoj, hindoj, japanoj, ktp. Estas rimarkinde, ke la skoltoj el Ĉeĥoslovakujo portas esperanta standardon.

Per tiu-ĉi impona parado, la Jamboreo estas

inaŭgurata. Lordo Baden-Powell nun parolas al la skoltoj. Li instigas ĉiujn al interfratiĝo kaj kreo je novaj amikecoj. Li estas akklamata ĝis raŭkeco de ĉiuj. La festo finis. Ni ĉiuj forlasas la kampon, dum la aeroplanoj ankoraŭ restas en la ĉielo desegnante kapricajn strekojn.

La 4 an. Aŭg. okazis la Kunveno de esperantistaj skoltoj en la Esperanta Tendaro. Ĉeestis ĉirkaŭ 220 geskoltoj el la jenaj 24 landoj: Anglujo, Aŭstralio, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Kimrujo, Latvujo, Litovujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Portugalujo, Rumanujo, Skotlando, Svedujo, Svislando, kaj Trinidad insulo.

Tiu Kunveno estis interese kaj pro tro granda programmaterialo oni devis ĝin interrompi kaj pritrakti la restantajn punktojn la 8an. La tuta programo estis la jena:

—Preĝo.

—“La Espero”: muzika himno. (ludis skolta orkestro).

—Esp. poemo: legis frato P. Balkanyi.

—Malferma parolo de la prezidanto, John Berggreen.

—Flagsalutoj por la flago de S. E. L. kaj por la flago esp. de Boulogne sur Mer, unua esp. flago de la mondo.

—Diversnaciaj salutoj.

—Prezidanta (Avoto-S. E. L.) depeŝo. (legis Karlo Payer, Hungarujo).

—Salutleteroj ricevataj. (legis A. P. Marqueta, Hispanujo).

—Sekretaria raporto. (legis I. Tarabout, Francujo).

—Kasista raporto. (legis A. Jensson el Norvegujo).

—Parolado de J. Navikas, Litovujo, pri: “Praktika uzo de Esperanto por skoltoj”. Akcepto de rekomendo.

—Sugestoj, dank’ kaj salutleteroj.

—Venontjara S. E. L. a. tendarloko. Sugesto.

—Diskutado pri la Jamborea esp. laboro.

—Finvortoj de la kunvena prezidanto.

—Preĝo.

Dum la tendartempo oni organizis belegajn ekskursojn por viziti la plej rimarkindajn lokojn de Hungarujo. Tre detale ni vizitis Budapeŝton, ĉarma urbego. Estas nefacile priskribi detale ĉiujn impresojn travivitajn tie. Ankaŭ Esztergoom, kun belega ŝipekskurso tra la Danubo. Balatonan Lagon. Vezprem, kaj aliaj. Kelkaj el tiuj ekskursoj kaj vizitoj estis gviditaj per Esperanto de la esp. interpretistoj ĉe la fremdulgvidista sk. fako.

En la Jamborea Ekspozicio estis bonega esp. fako, kun gazetoj, prospektoj, korespondado, ktp. En fenestro estis mondkarto, sur kiu el diversaj lokoj fadenoj gvidis al verda stelo, kaj kun jena klariga teksto: Esperanto estas malfermita fenestro, tra kiu niaj skoltoj korespondas kun la tuta mondo. ¡Sukceso!

En diversaj tendafajroj okazis esp. prezentadoj, sed la plej grava estis tiu, kiu okazis la 14 an. kies tuta programo estis dediĉita al Esperanto. Ĉeestis ĉirkaŭ du mil personoj, inter ili eksministro D-ro Augusto Benard kaj kelkaj skoltestroj, ankaŭ esperantistoj el Budapeŝto. Gvidis ĝin Jozefo Szecsei kaj Andreo Szikszay el Hungarujo. Ludis italaj, germanaj, norvegaj, hungaraj kaj hispanaj skoltoj esperante. Kelkaj gazetoj raportis.

En parolanta filmo, ankaŭ esp. skoltoj partoprenis. Parolis kaj kantis esperante antaŭ esp. standardo.—Entute estis kvinfoje esp. salutoj per radio. La 10an. okazis ankaŭ oficiala esp. radiodissendo dum kvin minutoj. Faris ĝin John Berggreen el Norvegujo.

La tendara gazeto “Magyar Czerkesz”, enhavis en ok numeroj naŭ artikolojn en aŭ pri Esperanto. Krome, Esperanto estis menciita en la tagprogramo de la gazeto trifoje.

Oni disdonis 2.000 ekzemplerojn de “Skolta Bulteno” kaj 3.000 de la diverslingvaj flugfolioj. La Esperanto Studrondo de Hungara Skolta Asocio eldonis belan libreton: “Kantas la Hungara skolto” kun hungaraj kantoj en esperanta lingvo.

La 15 an. Aŭg. oni oficiale fermis la Jamboreon. Denove ĉiuj skoltoj renkontiĝis en la paradejon. Okazis kelkaj elmontraĵoj. Fine, la Jamborea estro, Grafo Paŭl Teleki deklaris fermita la Jamboreon per belega parolado, en kiu li montris sian plezuron pro la rimarkinda, skolta laboro farita de ĉiuj. Ankoraŭ lasta parado fermis la Jamboreon. En tiu-ĉi parado, la esperantistaj skoltoj kuniris. Estis anoncitaj per laŭtparoliloj. Granda aplaŭdo!

Esperanto estis uzata ĉe la jenaj oficialaj institucioj: Esperanta Tendaro—Policistaro—Fremdulgvidistaro—Banko—Biletkontoro—Poŝtejo—Radiostacio—Skolta vendejo—Gazeta eldonejo—Ekspozicio—Vortareto—Tendarlibro kaj Rubandoj.

Laŭ tio, kion vi vidas, la skoltoj intense laboras pri Esperanto. Esperanto estis bela sukceso en la Budapeŝta Jamboreo. Sed mi deziras diri, ke ni, esperantistaj skoltoj, ŝuldas multe al tiu, kiu prenis sur sin la plej multan laboron por nia afero: S-ro Paŭlo Balkanyi, kiu persone kaj per helpo de siaj samideanoj en la esp. studrondo de H. S. A., faris bonegan propagandon por Skolta Esperantista Ligo.

Certe, post la Jamboreo, Esperanto havos grandan disvastiĝon inter la skoltoj. Ĉe ni, en Zaragoza, jam funkcias esp. kurso, kiun partoprenas 12 geskoltoj. Antaŭen, do.

A. PEDRO MARQUETA.

Hispana Agento de S. E. L.

LA MALGRANDETA MAGIA REĜO

En angulo de la buduareto, afabla rifuĝejo de eleganta virino, Ludoviko sidas turke sur feltigro kaj faras konstruaĵojn kun pecetoj de ligno. Estas adorinda infano kun grandaj helaj kaj lumaj okuloj, blonda hararo kaj rozvangaĵo.

Malgraŭ ke li atingis malagrablajn naŭjaran aĝon konservas ĉiun gracion kaj naivecon.

Proksime al sia filo sub la luma silklampo Klaudino turnis la foliojn de la libro, sen intereso.

Ludoviko finis senpripense romanon ponton levis sian princon kapeton kaj petis la patrinan aprobacion:—Kia saĝnas al vi patrino?

—Belega, mia filo... belega...

Kaj la brunaj okuloj, grandaj kaj melankoliaj de Klaudino ekstazis antaŭ la ago de sia filo.

Kaj kvankam la infano tre pezis ŝi levis lin de la planko kaj sidigis sur siajn genuojn.

—Vi vidos, ŝi diris kisante la infanon, kiaj belegajojn vi povos fari per la meĥanon kiun alportos al vi la Reĝoj.

—Ĉu vi estas certa, patrino, ke al mi alportos mehanon la Reĝoj?—demandas la infano.

—Certega, respondis la patrino. Mi mem enmetis en la poŝtejon, leteron de vi skribitan...

—Kaj se ili ne ricevos ĝin? demandis Ludoviko insiste timante seniluzion.

—Jes, mia filo, diris la patrino; ili ĉion ricevas, kaj la patrino ĵetis decidiga argumenton:

Ĉu vi vidas, ke la poŝt servo estas farata de anĝeloj?

—Oh! ekkriis Ludoviko konvinkita, kaj poste: Kion vi petis ke alportu al vi la Reĝoj, patrinetó?

—Se ili alportus al mi feliĉon!...

Ludoviko fiksas siajn dolĉajn okulojn sur sian patrino: Sed... ĉu vi petis ĝin al la Reĝoj?

Klaudino ridetas:—Ne, ili estas okupataj nur pri la infanoj. Mi jam estas iomete maljuna.

Ludoviko sulkgigas la brovojn kaj en sia buŝeto tramoviĝis demando kvankam li ignoris kion li devas demandi.

Subite iu venas interrompi la interparoladon de la patrino kun sia filo. Estas ĉambristino, kiu antaŭ la pordo alvokis la sinjorinon mistere.

Klaudino sidigas denove la infanon sur la fel-tigron, kaj ŝi malproksimiĝas per mallaŭtaj paŝoj. Ludoviko ne estas scivolema.

Tiun ĉi fojon tamen iomete intrigita la infano rigardas la vitropordo, kiun la ĉambristino, en sia rapideco ne fermis tute. Kaj post kelkaj minutoj Ludoviko vidas elpasi rapide, kiel ombroj sian patrino kaj la ĉambristinon kun granda skatolo.

Sed Ludoviko sen malkvieteco detruas ponton por konstrui akvokondukon. Kelke da minutoj pasis.

Sub la tolaĵo de sia liteto Ludoviko ne volas dormi. Li kuŝiĝis kun la decido atendi la Reĝojn. Lia patrino diris al li, ke la Reĝoj pasas tre frue enirante tra la rotondo de la ludilaĉambro.

Ludoviko jam ne volas mehanon. Li volas peti alian aĵon de la Reĝoj, kaj ĉar ne estas tempo por skribi novan leteron al la Reĝoj, Ludoviko atendas ilin. Li lasis malfermita la pordon de sia dormoĉambro komunikanta kun la ludilaĉambro. La Magiaj Reĝoj eniros sen bruo, kiel luna lumo, sed Ludoviko vidas ilin, kiel li vidas la blankajn radiojn kiuj alvenas ĝis la litkuseno.

Efektive, subite tri formoj grandaj kaj strangaj aperis en la klareco de la rotondo. Ludoviko sidigis sur la liteto sed ne eksaltis for. Ili! La tri Magiaj Reĝoj estis antaŭenirintaj al la dormoĉambro.

Ili estas tie! Ludoviko rekonis ilin. Baltasaro, alta kaj dika, tiu de vizaĝo kaj mano de ebono ridetis per siaj lipoj dikaj kaj naivaj okuloj. Gasparo, tiu de blanka vizaĝo kaj junecaj trajtoj rigardis dolĉe, kaj Melĉoro la maljunulo de longa barbo neĝa klinas sian kapon kun mieno aŭguste humila.

Ludoviko per mallaŭta voĉo, sufokita pro la emocio kuraĝis alparoli ilin:—Kiel vi eniris ĉi tien?

Melĉoro parolis:—Ni sciis ke vi estis atendanta, ĉar ni ĉion scias.

—Tiam, diris la infano—vi jam scias ke mi ne volas mehanon, kiun mi petis ĉar ĝi ne estas malgrandeta. Mi volas feliĉon. Ĉu vi alportas ĝin? Mi donos ĝin al ŝi.

La tri Reĝoj ŝanĝis ĝojan rigardon profundan, ne esprimeblan. Gasparo diris:—Feliĉecon ni ne povas doni al vi. Ĝi ne estas ludilo. Sed ni povas

doni al vi aliajn aĵojn; per ili vi povas atingi feliĉon.

Tiam la tri Magiaj Reĝoj malfermetis siajn purpurajn mantelojn kaj eltiris de apud sia brusto oran skatolon.

Melĉoro alproksimiĝis al la liteto kaj metis en la tremantaj manoj de Ludoviko sian donacon.

—Mi donas al vi la humilecon. Per ĝi vi venkos la fieron.

Gasparo sekvis la antaŭan Reĝon:—Mi donas al vi la justecon. Per ĝi vi venkos la kruelecon de la homoj.

La lasta ora skatoleteto de Baltasaro estas la plej granda.

—Mi—diris la nigra Reĝo—donas al vi la volon. Per ĝi ĉion venkos.

Kaj antaŭ, ol Ludoviko povus esprimi sian dankemon la tri Magiaj Reĝoj forglitis el la dormoĉambro sen bruo kiel ili estis enirintaj.

Sed kio okazas nun? De la ludilaĉambro alvenas bruetado de paŝoj. Ludoviko jam reveninta de sia emocio decidas elsalti de sia liteto.

En la ludilaĉambro iu estas sed ne Magia Reĝo, estas blanka figuro kiu desegniĝas en la kadro de la rotondo, klinanta sur granda skatolo.

Ankaŭ nun rekonas la infano la aperon.

—Patrino!—ekkrias mirigitē la infano.

Kaj sia patrino turniĝas ektimigita, konfuza, kvazaŭ ŝi estus farinta krimon.

—Mia filo!...—balbutas fine la patrino.—Vi!—diris la patrino—ĉu vi ne dormis?

Ludoviko ne respondas. Subite lia frunto mallumiĝis. Li kuras al la dormoĉambro, traserĉas la littolaĵon, rigardas sub la lito, serĉas sur tableto kaj revenas malrapide, kun grava esprimo en sia anĝela vizaĝo.

Li komprenas, ke li songis. Klaudino ŝancelas kaj ĉagreniĝas.

—Vi estis metanta tion tie por ke mi pensu ke la Reĝoj alportis ĝin—diris la infano.

—Vi estas freneza!—diris la patrino.

—La Reĝoj jam pasis kaj mi venis por vidi ĉu estis mehano, kiun la Reĝoj alportis al vi—diris la patrino.

—La Reĝoj ne pasis... diris la infano—ĉar Magiaj Reĝoj ne ekzistas. Estas vi; la patrinoj kiuj aĉetas ludilojn kaŝe, diris la infano.

La patrino terurigita rigardadis sian filon, en kies rigardo estas io nova, kaj turnas la okulojn al la pordo esperante, ke alvenos helpo por surmeti la iluzion kiu forkuras de la animeto naiva de sia filo.

Kaj kiel alkuranta al la alvoko, en la sojlo aperas silueto.

—Raŭlo—ekkrias kun ĝojo Klaudino.

La verdumo kiu devenas de lampo venkas la lunlumon; kaj Raŭlo metinta ankoraŭ sian manon en la interŝanĝilo elektra, demandis:

—Kio okazas?

Li estas homo altkreska maldika de sinteno distinginda kaj icmete fiera, en lia vizaĝo korektaj trajtoj forte akcentitaj, virece belaj, estas esprimo de ĉagreno morala, kaj malgranda kuntiriĝo de fizika laciĝo.

Sub la bordo de sia faldebla ĉapelo iomete klinita, la okuloj helaj sen brilo rigardas malprecize.

Klaudino malfruis momenton por respondi. Ŝi rigardas sian edzon, kiu restas apud la pordo apogita en la kadro. Ŝi vidas tra la fendajo de sia pelto, la ĉemizan antaŭaĵon ĉifitan, la kravatonodon

malfaritan... Kaj ŝi devas fari klopodon por paroli kun li.

—Nu okazas-diris fine la patrino-ke la Reĝoj venis por alporti mehanon de Ludoviko...

Mi eniris tien-ĉi por vidi ĝin... kaj nun la infano insistas, ke ne ekzistas Magiaj Reĝoj... (Li opinias ke la skatolon alportis mi. Tio ĉi ne estas vero, ĉu ne Raŭlo? Diru al la infano, ke estas vere ke ekzistas Reĝoj.

Kaj Klaudino fiksas sur sian edzon rigardon de petego preskaŭ ĉagrenitan. Li ricevas ĝin. Lia unua respondo estas brua ridego, maldelikata.

—Ne estas vero, ne-respondas la patro. La infano estas prava... Ĝis kiam li devas kredi tiun malsaĝon?... rediras la patro-Ne estas Magiaj Reĝoj mia filo, ne estas... Estas via patrino. Mi ne scias kion ŝi volas fari de vi ĉiam alkudrita al ŝiaj juĵoj... Kaj vi jam estas viro...

—Raŭlo!-riproĉas Klaudino malforte, sen fortoj por kribi, nenigite.

Estas silento dum kiu la infano rigardas al siaj gepatroj fikse.

—Kaj estas nur la gepatroj?-elserĉas-kiuj ludas la rolon de Magiaj Reĝoj? demandas la infano.

—Ne, ĉiu kiu volas-respondas la patro ridetanta.—Mi estis kelkafoje Magia Reĝo por via patrino... Tiun ringon kiun alportas via patrino mi metis en sia pantoflo...

—Tiam daŭrigas Ludoviko-vi estas kiu jam ne okupiĝas pri la patrino, kaj ne volas meti felicecon en alia pantoflo...

—Kial, diru al mi, kial vi ne metas felicecon se ŝi volas, ŝi bezonas pli ol mi la mehanon?...

—Raŭlo, mirigita, antaŭiras al sia filo, kiu kun ruĝaj vangoj kaj tremanta buŝeto, rigardas la patron kun indigno. Klaudino timigita ankaŭ alproksimiĝas.

—Ĉu estas-daŭrigas la infano-ke vi ne havas aĵojn, kiuj estas necese por doni felicecon?

—Ĉu vi ne scias kio estas ĝi?

Estas humileco, estas justeco, estas volo... Se vi ne havas, nenion de tio, mi havas, kaj mi alportos felicecon al mia patrino.

Jam ne estas surprizo, nek ektimo, estas teruro nedirebla kiu agitas la gepatrojn de Ludoviko.

La gepatroj levis lin de la planko kaj portas al la dormoĉambro kaj kuŝigas lin. Kaj ambaŭ murmuris per frazoj ĉagrenaj...

—Mia filo, kion vi havas? Kion okazas al vi?...

Ili kredas ke la infano deliras, ke estas kaptita de atako de terura kapdoloro.

Jam en sia liteto Ludoviko, ankaŭ pro la sintendo de siaj gepatroj insistas.

—Ĉi vi havas aŭ ne havas ĉion tion, paĉjo?, diris la infano.—Ĉu vi portas aŭ ne la felicecon al mia patrino?

—Jes, mia filo, jes-certigiŝ Raŭlo, kun sincera krio.—Mi promesas al vi.

—Tiam, ne gravas ke ne ekzistas Magiaj Reĝoj.

Kaj. Ludoviko, lace fermas la okulojn kaj ekdormas.

Raŭlo kaj Klaudino pasigis la restaĵon de l' nokto apud la liteto de tiu pri kiu ili opinias, ke li estas malsana. La dormado de la infano estas normala. Li ankaŭ ne havas febron. Tamen frue matene ili serĉas kuraciston.

La doktoro rekonas Ludovikon sen veki lin, kaj trankviligas tute al la gepatroj:—Estas perfekte.

—Tiam-diras denove silente la edzo-Kio estas tio?

—Estis ke Ludoviko estas tre inteligenta kaj tre naiva. Kaj estis sur ĉio miraklo de fila amo. Vi povas esti fiera pri via filo.

Estis li via Magia Reĝo, malgrandeta Magia Reĝo, kiu alportas felicecon, kiun mi senkonscie malproksimigis de vi... Pardonu min, Klaudino... Pardonu min pro li...

Klaudino plorante de ĝojo pardonas. La malgrandeta Magia Reĝo aŭdas la krakadon de kiso kaj malfermas la okulojn lumajn. Kun sia inteligento de homo divena kaj kun sia purblankeco de anĝelo li ridetas.

*Tiun ĉi rakonton tradukis
ESTRELLA MODREGO.*

MALNOVAJ PAĜOJ

EL HEINE

Ho suno, kolombo, violo, lili'
Mis amis vin multe, per granda pasi'.
Sed nun mi adoras nur unu juvelon,
La belan fajrhelan ĉielan anĝelon.
Ŝi estas al mi nun pli kara ol vi,
Ol suno, kolombo, violo, lili'.

A. KOFMAN.

EL HEINE

Sur tiu ĉi monto kunloĝas
Tri ĉarmoj en bela kastel',
Min feliĉigintaj per amo,
Pli dolĉa ol pura miel'.
Sabate min kisis Mario,
Dimanĉe—la bela Juli',
Kaj lunde min preskaŭ sufokis
Luizo en sia pasi'.

Sed marde ĉe ili estiĝis
Festtago, kaj venis de l' val'
Gastinoj en belaj kaleŝoj
Kaj gastoj sur aro-ĉeval.

Nur min vi ne vokis al festo.
Ho, kia malsaĝo, pro Di'!
L'onkloj kaj babilulinoj
Komprenis kaj mokis pri vi.

A. KOFMAN.

Eltirita el «Lingvo Internacia», n-ro 4.^a aprilo 1896.

SCIIGOJ

S-ro Johano Régulo el Tazacorte malfermis kursojn esperantajn; unu por fraŭlinoj al kiu ĉeestas 18 lernantinoj; alia por laboristoj al kiu ĉeestas 20, kaj alia por Instruistoj kaj geinfanoj al kiu alestas 16 geinfanoj kaj 4 instruistoj. Estas necese ke multaj esperantistoj, kiuj loĝas en urbejoj kaj vilaĝoj starigu, kiel S-ro Régulo, esperantajn kursojn; tiamaniere nia movado kreskos. Ni tutkore gratulas sinjoron Régulo kaj deziras al li kuragaĵon por longedaŭre subteni tiun ĉi agadon.

* * *

Ni sciigas al la fratecanoj, kiuj ludlotis en la Kristnaska Loterio, ke ĝi estis premiita.

Kiuj loĝas en Zaragoza povos ricevi la respondan monon ĉe Frateco aŭ ĉe Presejo Larruga, Convertidos 9. Kiuj loĝas ekster Zaragoza povos ricevi ĝin sedante la kvitancojn al Frateco por sendi al ili la monon per poŝta ĝiro.

Presejo F. Martínez - Strato Audiencia, 7-5 - Zaragoza (Hispanujo)